Jarkolekto : 2011 | Numero : 4 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

***Senlime***

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La kotizo (10 € - denove deviga) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Zamenhof-festo en Oostendo ☺ !**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (1/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo *ferie***
**p. 5 : Al pli da esperanto-videbleco…**
**p. 6 : Verviersa angulo (reprise des cours).**

# Zamenhof-festo en Oostende,
## dimanĉon, la 11an de decembro 2011



**Zamenhof-festo ĉe «La Konko»**

***Het Zamenhoffeest is de herdenkingsdag van de geboortedag van de stichter van het esperanto : L. Zamenhof. Hij werd geboren op 15 december 1859 te Bialystok (Polen).***

Pliaj informoj p.2 :

Marc **Cuffez**, Esperanto-grupo La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Flandrio, Belgio (flandrio@hotmail.be).

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Irlando

Dutaga trilanda renkontiĝo ne sufiĉus por la **granda rondiro ĉirkaŭ Irlando** al kiu ni invitas vin…

Riĉa kultura heredo, belegaj pejzaĝoj, proverba vivdolĉeco, ĉiam varmega akcepto fare de la enloĝantoj : jen kio sufiĉas por klarigi la entusiasmon vekitan de Irlando. La kamparoj plenaj je keltaj ruinaĵoj, mezepokaj kasteloj kaj nobeldomoj, posedas neneadeblan majestecon.

La granda rondiro per filmetoj konkukos vin de Dublino al Dublino tra multaj vidindaĵoj kiel Monasterboice, Belfast, la Ŝoseo de la Gigantoj, Derry, Glenveagh, Westport, la famega Connemara, Galway, Burren, Killarney, la klifoj de Moher, la ringo de Kerry, la **Roko de Cashel** (foto)…



Bonan vojaĝon al ĉiuj !

**21-10** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Irlando***", aŭdvida prelego de J.M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

## Venu ludi per *Crossword forge*

***Crossword forge*** estas komputila programo konceptita por tre facile krei krucvort-enigmojn. Ĝia interagemo permesas surekrane solvi ilin.

La programo ebligas krei kradojn por la reto.

Ĉar ĉiu lingvo havas sian propran alfabeton, la konceptintoj ne forgesis esperanton!

Ortografia korektilo estas enigita por eviti eventualajn erarojn.

Konsiloj povas esti aldonitaj por helpi la uzantojn kaze de malfacilaĵo.

Kiel sciate, la celo de tiu ludo estas plenigi blankajn kvarangulojn kun leteroj, formante vortojn aŭ frazojn, per solvado de indicoj kiuj kondukas al la respondoj.
Ombritaj kvaranguloj kutime apartigas la vortojn aŭ frazojn.

Ni invitas niajn geamikojn kaj membrojn veni por kontroli siajn konojn en nia lingvo. Amuzo garantiita.

Por pliaj precizigoj…

**11-18** 20h00 BE-Kelmis, "***Konstrui kaj solvi krucvort-enigmojn kaj kaŝitajn vortojn per programo kreita ankaŭ por esperanto***".
Prelego de D. **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

## Zamenhof-festo

Konklude de labor-kunveno dum PEK-o en Mozet oni interalie proponis plifortigi la rilatojn inter valonaj kaj flandraj grupoj per ĝemeliĝoj…kaj komuna (nacia) Z-festo. Plej interesa ideo !

Tamen kompreneble jam okazis interŝanĝoj sen ĝemeliĝoj: kelkaj esperantistoj el Oostende (Flory Witdoeckt ,…) foje partoprenis nian Z-feston en Kelmis aŭ Verviers – malgraŭ la relative granda distanco! Ni sugestas almenaŭ unu fojon reciproki al ili kaj invitas niajn membrojn al …

**Zamenhof-festo en Oostende**, Flandrio, Belgio :
Zamenhoffesto kun malvarma tagmanĝo, tombolo, kantado, kvizo ekde la 11:30 horo.
Komuna foriro trajna el Verviers-Centro je la 7h34 (daŭro de la vojaĝo: 2h45 – vojaĝkosto: maks. 15 EUR per «rail-pass»).

*«Het Zamenhoffeest is de herdenkingsdag van de geboortedag van de stichter van het esperanto : L Zamenhof. Hij werd geboren op 15 december 1859 te Bialystok (Polen).»*

La Zamenhof-festo estas la memortago pri la naskiĝo de la fondinto de esperanto, L. Zamenhof. Li naskiĝis la 15an de decembro 1859 en Bialistoko (Pollando).

**12-11** 11h30 BE-Oostende : **Zamenhof-festo**
Marc Cuffez, Esperantogrupo La Konko, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgio.
Inf. flandrio@hotmail.be

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**09-16** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Virtuala trilanda renkontiĝo en Napolo***", prelego de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**09-23** 20h00 BE-**Verviers**, preĝejo de la Hunj-kvartalo : "**Post 125 jaroj, esperanto estas preta por uzo**", prelego franclingva de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**10-21** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Irlando***", prelego de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-18** 20h00 BE-Kelmis, "***Konstrui kaj solvi krucvort-enigmojn kaj kaŝitajn vortojn per programo kreita ankaŭ por esperanto***".
Prelego de D. **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**12-11** 11h30 BE-Oostende, **Zamenhof-festo** (malvarma manĝo, tombolo, kantoj, kvizo,…).
Inf. Marc **Cuffez**, Grupo "***La Konko***", Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgio.
rete: flandrio@hotmail.be

✪

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **03-16**, **04-20**, **05-18** kaj **06-15**.

**16-09** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Rencontre virtuelle*** (des espérantistes des 3 pays) ***à Naples***", par J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**23-09** 20h00 BE-**Verviers**, église des Hougnes : "**Après 125 ans, l'espéranto est prêt à l'emploi**", conférence en français par J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**21-10** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Irlande***", conférence de J.-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

**18-11** 20h00 BE-Kelmis, "***Construire et résoudre des mots croisés et mots cachés avec un programme conçu pour l'espéranto***".
Conférence de D. **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**11-12** 11h30 BE-Oostende, **Fête Zamenhof** (repas froid, tombola, chants, quiz,…).
Inf. :
Marc **Cuffez**, Groupe "***La Konko***", Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, Belgique.
mail: flandrio@hotmail.be

✪

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **16-03**, **20-04**, **18-05**, **15-06**.

# Novaĵoj pri KELMIS✪ ferie.

## (el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

**Minejo Schmalgraf** (foto sube)

Jam dum la mezepoko, la homoj ekspluatis la zink-ercon en la regiono de Kelmis. La ĉerpejoj estas aparte riĉaj kaj kelkloke supreniras ĝis la ter-surfaco. Dum la 15a jarcento, oni notas gravan zinkercan ekspluatejon en la loko nomita Schmalgraf.

Jam en 1858, la «S.A. Vieille Montagne» [Malnova Monto] inventaras la mineajn teramasojn kaj komencas la ekspluatadon en 1868. Ĝis 120 ministoj laboris por la mina societo kaj je la fermo de la minejo, la 1an de majo 1932, ili estis eltirintaj 752.325 tunojn da kruta minaĵo, kiuj estis kondukitaj al la lavejoj de Kelmis per fervojo.

La ekspuatado finiĝis je profundo da 290 m, neniam antaŭe atingita en Belgio ĉe tiutipa ekspluatejo.

**Galerio Oskar (Stollen)**

Konstatinte abundajn alvenojn da akvo sekve de la fosado de la mino en la kalkŝtono, la S.A. «Vieille Montagne» malfermas ek de 1862 elfluan galerion borde de la rivero Hohn.

La laboroj pri tiu galerio, longa je 500 m kaj profunda je 42 m, finiĝis en 1867. La arkivoj de la min-societo atestas pri multaj nom-ŝanĝoj de la galerio : elflua galerio, Max Stollen, drenada galerio ...

La loka loĝantaro adoptas la nomon «Galerio Oskar», sendube reference al la inĝeniero responsa Oskar Bilharz, kiu ankaŭ estis urbestro de Neŭtra Moresnet de 1882 ĝis 1885.

**Promenado**

De 2003, la 52 ha kiuj konsistigas tiun arbaron, ĉirkaŭitan de paŝtejoj, apartenas al la Valona Regiono. La biodiverseco de tiu arbaro rimarkindas.

La pejzaĝo estas modelita de la rivero Hohn kaj dum pli proksima estinto (1862-1931) de la homa stampo, nome de la eltiro de la kalamino (zink-erco). Tiu aktivaĵo lasis multnombrajn postrestaĵojn, interalie du galeriojn (galerio Oskar kaj galerio Auenberg), fervojon da 2400 m kaj kalaminan teramason.

La Kelmis-aj ĉerpejoj, riĉaj je pezaj metaloj, influis la lokan kreskaĵaron. Kelkloke, nur plantoj rezistemaj aŭ toleremaj pri pezaj metaloj pluvivis. La plej konata ceerte estas la kalamina penseo (Viola calaminaria).

La herbeca kaj arbeca tavoloj ankaŭ prezentas grandan specian diversecon.

La faŭno trovas en tiu medio multajn disvolviĝajn eblecojn. La galeriaj enirejoj estas taŭg-aranĝitaj por faciligi la envenon de vespertoj.

Por ebligi al la vizitanto plene ĝui pri tiu natura juvelo, pado da 4,5 km estas signalizita per verda kruco (ne stelo !) sur blanka fono.

Ni respektu la naturon lasante tiun ejon tia, kia ni ĝin trovis alvenante. Dankegon.

Kromaj informoj ĉe :

***Musée de la Gueule***, Kelmis [muzeo pri la rivero Gueule]

***http://www.casinoweiher.info***



# Al pli da esperanto-VIDEBLECO…

Ni, esperantistoj, volas «vendi» (fakte donaci) nian karan lingvon, esperanton. Konsekvence ni devas, kiel ĉiu komerca entrepreno, senĉese reklami. Iuj opinias ke esperanto estas sufiĉe konata kaj bona produkto, kaj ne necesas reklamadon : grava eraro ! Observu grandajn entreprenojn kiel «Coca-Cola». Ĉu ili ĉesas reklami ? Tute ne ! Ili eĉ ne hezitas krei eventojn por rememorigi pri si : publika festo, prez-ŝanĝo, ekfabrikado de flanka produktaĵo, modifo de la ujo, k.t.p.

Entrepreno kiu ne plu reklamas tuj ekperdas klientojn. Estos same pri esperanto. Kaj esperantistoj ne disponas pri la necesaj financaj rimedoj por uzi la servojn de fakaj reklamistoj. Eble vi opinias ke ni ĉiaokaze estas tro malmultnombraj por ion valoran fari. Sed, kiel diris Margaret Mead, ***«neniam dubu pri la fakto ke malgranda grupo da pripensintaj kaj agemaj homoj povas ŝanĝi la mondon***».

Ni unue pripensu kiel prezenti esperanton kaj poste agadu. Kutime la esperantistoj sufiĉe bone konas la kvalitojn de sia kara lingvo, sed al kelkaj mankas iom da «psikologio» en la komunikado. Pro tio, nia unua tasko estus iomete spertiĝi pri (**paca**) komunikado. Nur parenteze mi skribis la vorton «paca» sed kompreneble plej gravas ke ni ne vundu niajn kundialogantojn, ekzemple tro primokante la fuŝantojn de la angla lingvo, la senkonsciajn malŝparantojn pro troa pago por lingvo-kursoj… se ne simple la homojn kiuj ne kapablas lerni lingvojn (kial do ili tamen sentus sin kapablaj lerni esperanton ?).

Ne mankas libroj, staĝoj kaj ttt-ejoj pri neperforta komunikado. Konsultu ekzemple verkon de Marshall Rosenberg aŭ vizitu la retejon wikipedia pri tio.

Kaj ek al la agado !

Ah, jes… sed vi (jam) ne havas kunparolanton pri esperanto : vi unue devas kapti la atenton de la ne-esperantistoj ! Diversaj (jam iomete konataj de vi, ĉu ne ?) reklam-teknikoj povas esti uzataj

Mi simple rememorigu pri kelkaj el ili : insignoj, t-ĉemizoj, afiŝoj kaj gluafiŝetoj (por domo, oficejo, veturilo,…), mencio pri esperanto sur vizitkarto, hejma enirsonorilo, retejo kaj telefon-indikilo, respondila mesaĝo, ŝlosil(portil)o, flago… Ankaŭ via kreemo estu… ***senlim**a* !

La ĉef-ideo estu : ni vidigu nin. Efektive (kaj memkompreneble) por plej multaj homoj, esperanto ŝajnos serioza kaj valora afero nur kiam multaj personoj parolos ĝin. Ni do minimume malkaŝu nin : fieru pri via esperantisteco !

Notu ankaŭ ke, ekzemple, glui afiŝeton pri esperanto sur via veturilo ne estas nur reklamado : eble samidean(in)o miros pri la ĉeesto de via veturilo kaj atendos vin por agrabla babilado (tio plurfoje okazis al mi).

Ofte ni mem havas la impreson ke nia afero ne bone funkcias kaj foje pensas pri forlaso, dum fakte la situacio estas malpli grava ol ni imagas : ekzempe, mi vizitis muzik-kurson dum du jaroj kaj nur poste samklasanino sciigis al mi ke ŝia patro, kiun mi tute ne konis, estis esperantisto k.t.p. !

Ni ankaŭ montru ke ni vere povas kaj emas uzi esperanton. Konsekvence, alvenante en turisma oficejo aŭ vidindaĵo, en hotelo,… ni klopodu uzi esperanton, ekzemple petante informon aŭ turisman informilon en esperanto.

Memoru ke ***Senlime*** kaj la esperantista grupo de Verviers, okaze de preskaŭ ĉiuj trilandaj renkontiĝoj, eldonis esperanto-tradukon de diversaj lokaj informiloj (promenadoj en **Verviers**, kastelo **Franchimont**a, muzeo pri lesivo en **Spa**, muzeo en **Weris**,…). Ili ofte restas surloke peteblaj : nepre faru tion !

Antaŭ pluraj jaroj, vizitante la spac-komunikadejon en Lessive, mi hazarde kaj plej mirige eksciis ke unu el la tieaj gvidistinoj estas esperantisto. Same (sed malpli surprizige) okazis antaŭ multaj jaroj dum grupa vizito de oficejo ĉe Eùropa Komunumo ke akceptis nin per perfekta esperanto iu loka gvidanto… ne-«esperantisto» !

Kompreneble kaj fine, ni mem nutru la mondon per esperantaĵoj. Multaj el ni kapablas bonege fari tion. Bona kono de esperanto eĉ ne vere necesas : simple aŭdigi esperantistan kantiston en via veturilo antaŭ ruĝa lumsignalo aŭ en via oficejo se eblas, povas havi neatenditajn konsekvencojn.

Ne forgesu la vortojn de Zamenhof : «esperantisto estas ĉiu homo kiu uzas la lingvon por kiu ajn celo». Por esti vera esperantisto, **necesas** (nur) uzi esperanton. Faru tion publike.

***Bonan ŝancon !***

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année une ou plusieurs des cotisations suivantes au compte

**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est obligatoire et fixée à 10 EUR. L'abonnement éventuel à ce bulletin en version «papier» s'élève à 12€ à payer en supplément.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2012** (EGV) **16 €**
**U.E.A. 2012** (MA-T) **62 €**
***Senlime*** **(cotisation 2012) 10 €**

**en indiquant le bénéficiaire, le nom du membre cotisant et l'année du paiement :**
***«cotisation… de…. pour….».***

# Gerda mal-aper-is/as/os (de-nov-e : kurso)…

Je parle l'espéranto depuis plus de trente-cinq ans et j'ai dans ma région des dizaines d'amis qui le parlent aussi (plus des centaines qui l'ont appris et ne s'en servent apparemment pas beaucoup). Directeur d'école, je recevais régulièrement des élèves "primo-arrivants" parlant les langues les plus diverses et que je ne pouvais pas aider. S'ils avaient appris l'espéranto...

L'espéranto aura, l'an prochain, 125 ans donc certains se demandent pourquoi, en tant d'années, nous n'avons pas encore «réussi»… et cherchent les causes de cet «échec» ! L'espéranto serait, selon certains, une langue «purement» construite : construite elle l'est en effet, mais avec des éléments ("racines" de vocabulaire) puisés dans le pot commun des grandes langues de communication, ce qui explique sa très grande facilité d'apprentissage – et avec une grammaire dépouillée de toutes les "subtilités" idiotes et vexatoires qu'on met des années à apprendre (si on y arrive) à l'école primaire (ce n'est pas pour rien que certains étrangers parlent "petit nègre" toute leur vie!).

De plus, l'espéranto est devenu, en 125 ans, une langue à part entière avec sa littérature et sa "culture", ce qui en fait le premier choix au cas où "on" comprendrait enfin qu'avec l'anglais (très difficile à s'approprier!) on ne va quand même pas partout!

Rappelons que c'est en 1887 que L. Zamenhof a publié son premier livre sur l'espéranto : 16 règles de grammaire et un petit millier de «mots» de vocabulaire. En fait, nous préférons parler de «racines», assemblables comme des briques de lego pour former de nouveaux mots. Ce ne sont que les bases de l'espéranto, appelé par son fondateur à évoluer dans les mains de ses locuteurs.

1905: premier congrès universel d'espéranto à Boulogne-sur-Mer. 688 espérantistes - qui n'avaient jamais eu l'occasion de converser en espéranto que par écrit - découvrent l'efficacité de leur nouvelle langue.

1987: centième anniversaire de l'espéranto. Les espérantistes sont des millions et les infrastructures de Boulogne sont trop petites pour accueillir les 6000 participants pressentis pour le congrès universel.

L'évolution attendue s'est produite. Sur le plan du vocabulaire, par exemple, même dans les domaines de pointe (sciences, informatique,…) l'espéranto comprend désormais autant de «mots» que les autres langues. Mais, formés essentiellement à partir des racines de base proposées par Zamenhof, ils s'apprennent sans grande difficulté.

**Conférence** à ce sujet au local de l'église des Hougnes (rue de Jehanster, VERVIERS), le vendredi 23/09/2011 à 20h00.

J.-M. **Jacques**